



# ESPERANTO NORMANDA BULTENO

ESPERANTO - NORMANDIE

Redaktas: Pierre QUILLAUD 16, rue Lt Vaisseau Paris  
76120 LE GRAND-QUEVILLY Tel. 02 35 69 66 09  
Abon-Kotizoj: 8 Eŭroj Esperanto - Normandie  
CCP 283 - 40 H Rouen

## EDITO DU PRESIDENT

Karaj geamikoj

En tant que président de la nouvelle fédération Espéranto-Normandie, je me devais de me présenter un petit peu. Certains d'entre vous me connaissent peut-être déjà en tant que Sébastien Erhard, d'autres me connaissent sous le nom d'Henri De Sabates, et pour ceux qui ne me connaissent pas du tout : rassurez-vous, il s'agit bien d'une seule et même personne, seulement Sébastien est mon nom dans le civil et Henri mon nom de scène ; donc libre à vous de m'appeler comme il vous plaira.

Je suis un ancien normand qui revient sur les terres après 5 années d'absence. " Absence où ? " se demanderont peut-être les plus curieux d'entre vous. La réponse est que je me trouvais en Bretagne, où je travaillais professionnellement comme animateur pédagogique et culturel pour l'association Espéranto 22. Dans ce cadre-là, j'ai pu effectuer de nombreuses actions pour faire connaître la langue internationale espéranto : en l'enseignant dans les lycées de St-Brieuc (en collaboration avec des partenaires publics tels l'Inspection Académique ou le CDDP), en animant des émissions radiophoniques sur l'espéranto, en élaborant du matériel d'exposition ou des outils pédagogiques... J'espère pouvoir faire partager une partie de cette expérience enrichissante au mouvement espérantiste de Normandie, afin de lui redonner un peu plus de vitalité !

En effet, le bureau à la tête d'Espéranto-Normandie a un peu changé : de nouvelles têtes, une moyenne d'âge plus jeune, des idées pleines la tête et de la motivation. Mais il ne faut pas oublier qu'une association, ce n'est pas seulement un bureau qui déciderait et agirait à la place de tous : au contraire, Espéranto-Normandie c'est avant tout vous, les membres de cette fédération. J'aimerais pouvoir contribuer à faire évoluer cette association, profiter de cette nouvelle fédération et de cette nouvelle équipe pour donner un visage neuf à notre mouvement normand : par exemple en élaborant un site Internet pour Espéranto-Normandie, en faisant de l'information dans les universités de Rouen et de Caen, en présentant mon spectacle en espéranto " Stil-Ekzercoj " à des publics non-espérantophones pour leur faire découvrir la langue de manière distrayante, en montant un groupe actif sur Rouen, en informatisant la base de données d'Espéranto-Normandie. Ce ne sont là pour l'instant que des projets, mais leur réalisation ne dépend pas que de moi, ni seulement du bureau, mais de nous tous, vous et moi qui composons cette fédération, et de tous ceux qui se porteront volontaires pour faire avancer ces projets.

Une autre chose qui mériterait d'évoluer, c'est ce bulletin Normanda Bulteno, dont Petro aimerait bien transmettre la rédaction dès que possible. Ce bulletin, ne l'oubliez pas, c'est le vôtre : il est le miroir des activités de la fédération, et est un lieu d'expression pour tous ses membres. Donc n'hésitez pas à y participer ! Si vous ou votre club a récemment accompli quelque chose en rapport avec la langue espéranto ou au moyen de celle-ci, ou si vous-même avez une passion que vous aimeriez partager ou faire connaître par un article en espéranto, n'attendez pas plus longtemps pour envoyer votre contribution au rédacteur du Normanda Bulteno ! Il existe aussi un autre lien pratique entre les espérantistes de Normandie pour informer et être informé rapidement des grands événements espérantophones dans notre région, c'est la liste de diffusion pour ceux qui ont un accès à Internet : ainsi, si vous avez une adresse électronique et que vous ne recevez pas encore les messages de cette liste, vous pouvez vous y abonner gratuitement en envoyant simplement un message vide à l'adresse [normandio-abonnement@yahoogroupes.fr](mailto:normandio-abonnement@yahoogroupes.fr)

Actuellement, le vent est en train de tourner en faveur de l'espéranto : le célèbre " rapport Grin " \* en est bien la preuve, car il démontre officiellement que l'espéranto est bien la solution la plus équitable et la plus économique pour le problème linguistique de l'Union Européenne. Un autre événement important est la naissance de la première chaîne de télévision entièrement en espéranto que l'on peut regarder à partir du site <http://internacia.tv> ; c'est une nouvelle étape dans l'histoire de la langue, car l'espéranto il ne s'agit pas seulement d'en parler, mais aussi de le parler, et cette télévision en espéranto donne une bonne occasion pour le pratiquer . La Normandie est une région riche en potentialités pour faire connaître et développer l'espéranto, c'est à nous tous de saisir cette opportunité pour faire avancer cette belle idée de langue internationale, et plus nombreux on sera à s'activer dans ce sens, plus cette idée avancera dans les mentalités : *lorsqu'une personne rêve, il ne s'agit que d'un rêve, mais lorsque plusieurs personnes font le même rêve, c'est alors le début d'une réalité...* "

Je vous donne rendez-vous à l'assemblée générale d'Espéranto-Normandie qui aura lieu le Dimanche 9 Avril 2006, dans le VVF de Port - Bail (Manche) pendant le congrès des cheminots espérantophones. Ce sera l'occasion de faire plus amples connaissances et de nous rencontrer. Mais d'ici-là, n'hésitez pas à envoyer vos articles pour le Normanda Bulteno, à nous écrire pour nous soumettre vos projets ou vos propositions d'aide. Enfin, la fédération vient de faire l'acquisition de 3 exemplaires de la nouvelle exposition d'Espéranto-France : si vous tenez un stand sur un forum ou si vous avez des endroits pour présenter une expo sur l'espéranto, pensez à vous en servir, ces expositions sont là pour cela et restent à votre disposition.

Ĝis baldaŭ !

Via prezidanto,

Sébastien au<sup>~</sup> Henri (comme il vous plaira)

-----  
Sébastien Erhard, alias Henri De Sabates

Prezidanto de la federacio "Esperanto-Normandio"

Adresse / Adreso : 13 TER rue Raymond Botté, 76 380 Canteleu

Téléphone / Telefono : 06.15.21.48.93.

Courriel / Retadreso : [hodos@free.fr](mailto:hodos@free.fr)

Site / TTT-ejo : <http://elektu.free.fr>

\*\*\*\*\*

\* Le rapport Grin dont parle Sébastien dans son éditorial est une étude commandée par le Haut Conseil de l'évaluation de l'école, rédigée par le Professeur François Grin et publiée sous le titre

"L'enseignement des langues étrangères comme politique publique"

Trois scénarios sont envisagés : le tout à l'anglais, le plurilinguisme, l'espéranto

Le Professeur Grin est favorable à la troisième solution

La Redaktoro.

## DES NORMANDS EN RUSSIE

De la 17a de septembro ĝis la 1a de oktobro 2005, Claude Ferrand, Gigi kaj Gérard Sénécal, tri reprezentantoj de Hérouville - Esperanto, vojaĝis al Rusio. Sinsekve, ili vizitis Tihvin-on, Moskvon kaj Sankt-Peterburgo-n.

La Tihvinaj esperantistoj estis organizintaj seminarion pri la estintaj kaj estontaj rilatoj inter ili kaj la esperantistoj de siaj tri ĝemelurboj : Imatra (Finlando), Trosa (Svedio) kaj Hérouville St Clair.

Post tiu renkontiĝo en Tihvin, la tri normandaj klubanoj kaptis la okazon por turismi en la du plej famaj urboj Moskvo kaj Peterburgo.

Dank'al efika zorgado de fame konata Miĥaelo Bronŝtejn el Tihvin, gastigitaj kaj gviditaj de la lokaj geamikoj, ni travivis tre agrablan restadon en ĉiu vizitita urbo.

### Nia restado en Tihvin :

La renkontiĝo de esperantistoj el ĝemelurboj okazis la 19an de Septembro, en malgranda salono de la urbodomo. Estis planita pli vasta interkomunikiĝo sed esperantistoj el Imatra kaj Trosa ne povis alveni pro samdata propra skandinavia forumo de esperantistoj. La renkontiĝon partoprenis Helena Smirnova, ĉefa fakulino pri eksteraj rilatoj kaj internaciaj programoj de Tihvina distrikto, membroj de la esperanta klubo kaj de amikeca societo "Tihvin - Heruvil" kaj ni tri.

Ni parolis dum la renkontiĝo en tri lingvoj (rusa, franca, esperanta) pri tio ke ĝemelaj ligoj de niaj urboj devas vastiĝi, tuŝi diversajn sferojn de agado kaj okupiĝi ne nur pri ellaborado de reciprokaj projektoj ĉe la urbodoma nivelo, sed ankaŭ pri interkomunikado de simplaj civitanoj de niaj urboj ktp... Dum tiu ne tre interesa renkontiĝo, oni tro ofte parolis al ni kvazaŭ kiel reprezentantoj de la urbo Hérouville. Ekzemple, oni parolis pri eblaj agadoj kiuj tute ne koncernis nin sed verŝajne povus koncerni bibliotekon kaj lernejojn. Pro tio, mi atentigis ke ni estis tie kiel simplaj civitanoj kaj esperantistoj. Iu aldonis ke lernado de Esperanto helpas la venkon de la lingva baraĵo.

### La vizitoj en Tihvin :

Per ĉiĉeronado de Tatiana Bronŝtajn, ni vizitis la muzeojn, la monaĥejon kaj ties preĝejon kie la fama ikono, somere 2004, retrovis sian lokon post longa ekzilo en Usono. Tamen ni ne kisis la ikonon kiel, pie kaj eĉ ameme faras la rusaj diokredantoj.

En la muzeo (kie ŝi laboras), Jelena Lojkina gvidis nin kaj pasie parolis pri familio kaj vivo de Rimski - Korsakov.

Kiu naskiĝis en Tihvin. Sed la plej ŝatata momento okazis kiam tradicie vestitaj, kantis por ni kelkajn popolajn kantojn, deko da geknaboj. Tre kortuŝitaj ni estis. Ŝaŭmvinon, kukojn, bombonojn, teon aŭ kafon oni kune trinkis kaj manĝis ĝis la fermo de muzeo.

Direktorino de la biblioteko ankaŭ vizitigis sian laborlokon kaj ŝi longe parolis pri la grava helpo de nia urbo, Heruvil, por renovigi lokon, riĉigi la libron de franca fako, akiri novan komputilon... ktp. Tiu Nina Khabukina estis parolneelĉerpebla ! Denove, kukojn, bombonojn, teon, oni proponis al ni.

Alian vesperon, francalingve ni respondis al demandoj de homoj kiuj studas nian lingvon dank'al helpo de Heruvil - urbestro kiu pagas la instruistojn. Ili estis tre scivolemaj pri nia vivmaniero, niaj salajroj, pensionoj, nia opinio pri Rusio, eĉ nia opinio rilate al Putin ! Kvankam la nuna lingvnivelo de tiuj lernantoj (plenkreskuloj kaj infanoj) ne sufiĉas al la plimulto, kuraĝe kaj simpatie kelkaj el ili provis ekzerci la lingvon.

### La esperanta klubo de Tihvin :

La malnova kerno de tiu klubo konsistas nur el kelkaj konataj geamikoj : Miĥaelo, Viktoro, Saŝa, Vasili, Vera kaj Zoja. Ili precipe zorgas pri organizado de diversaj lokaj manifestadoj : tendaroj, renkontiĝoj, jubileoj.

Dufoje semajne, dum ses monatoj, de oktobro ĝis marto, du virinoj, junaj ekslernantinoj de Miĥaelo, instruos ĉi-jare, la komencantojn dum Miĥaelo instruos la duan gradon. Legolibro por komencantoj verkita de Miĥaelo, "Mamutido Miĉjo" estas uzata.

Ili ne havas aliajn kunvenojn, krom por prepari specialan manifestadon. Ĉu pro tio aŭ aliaj kialoj, la lernantoj, jaro post jaro, malaperas "en la naturo" kaj ne kreskas la membraro de la klubo.

Pri estontaj rilatoj inter niaj kluboj, Miĥaelo sugestis interŝanĝon de instruistoj dum ekzemple 3 semajnoj :

Volontulo de Heruvil - Esperanto povus instrui Esperanton en Tihvin kaj ankaŭ partopreni en la diversaj kursoj de franca lingvo. Siavice, iu volontulo de Tihvin povus same instrui ĉe ni.

Gérard SENEAL  
en Hérouville St Clair (14)

\*\*\*\*\*

### NI RIDETU :

#### RUSA RAKONTETO

Familio en Uzbekio konsistis el 16 personoj : 14 infanoj kaj la gepatroj. Kiam naskiĝis la 14a infano, la patro fiere anoncis : " Ni nomos lin < Lasta > ĉar li nepre estos nia lasta infano ! "

Bedaŭrinde, la sekvantan jaron, la patrino denove gravediĝis. Iu ŝerculo demandis al la denove-estonta patro :

" Kiun personan nomon vi elektos ĉi - foje por via 15a infano ? "

Tute serioze la patro respondis preskaŭ plorĝemante : " Post - Scriptum ! "

## VIZITOJ de EKSTERLANDANOJ en NORMANDIO :

Yves NICOLAS kontaktis Lena Karpunina ; ŝi nun loĝas en Berlino sed kulture kaj lingve ŝi estas Rusino kvankam ŝia gepatra lando estas Taĝikio. ( Taĝikio estas Azia respubliko de eks - Sovetio). Ŝi kantas rusajn romancojn tradukitajn en Esperanton. Ŝi ankaŭ povos rakonti pri sia devenlando Taĝikio . Eble la rondvojaĝo okazos dum Marto

Dum lasta ĝenerala kunveno , Gérard Sénécal parolis al ni pri delegacio de ge-Japanoj kiuj deziras viziti nian regionon kaj loĝi ĉe esperantistoj de niaj normandaj kluboj. Li ĉiam rilatas kun ili kaj eble, ili alvenos dum Septembro 2006.

\*\*\*\*\*  
**KAJ NUN LA KASISTO !!!**

Mi klopodis al CCP kaj nun vi povas fari vian ĉekon je la nomo de : Esperanto Normandie CCP 283 40 H Rouen Tiu bulteno estas la lasta por la jaro 2005. Jam eblas pagi vian abonkotizon por 2006 !!!

**RIGARDU ĈU VIA NOMO APERAS EN ĈI - SUBA LISTO :**

**ĈU VI PAGIS VIAN ABONON POR 2005 ? :**

Listo de pagintoj : Gesinjoroj : Bachimont, Bataille, Bessière, Becue, Bonnet, Caron, Chalm, Colombel, Defrance, Dubois, Dufeu, Duflo, Dufresne, Dufossé, Duhamel, Duval, El Bahri, Erhard, Esp.Cotentin, Dolard, Evrard, Freslon, Gibert, Guérout, Guerre, Guilmet, Hubert, Huet, Jean, Haulard, Hébert, Helbert, Jourdaine Ml, Jouvin, Lamy, Lebrun, Lecouvreur, Lehericey, Lemarchand, Leprévost, Leroy, Lesueur, Lévesque, Lévy, Loisel, Longuet, Magerel, Marie, F, Mary, Michaud, Millet, Moyon, Nardin, Nicolas, Paris, Paumier, Pottier, Quillaud, Rauch, Robiollé, Rolland, Schertzer, Séry, Tailpied, Tanguy, Teani, Tierce, Touileb, Turmel, Zilliox.

\*\*\*\*\*  
**NIAJ NORMANDAJ KLUBOJ :**

Ĉiam aktivaj estas kluboj kiuj organizas kunvenojn kaj kursojn :

En Alta Normandio : Le Havre, Yvetôt, Rouen, Les Andelys

En Malalta Normandio : Hérouville Saint Clair, Cherbourg

Diversaj izoluloj en urbetoj aŭ vilaĝoj propagandas kaj instruas la lingvon

### ESPERANTO COTENTIN FORUM DES ASSOCIATIONS 27/08/2005



### Ĝenerala Kunveno de Esperanto - Cotentin 2005

La ĝenerala kunveno okazis la 19an de Novembro. Ĉiuj membroj de la grupo ĉeestis, interalie du novaj membroj. Madeleine Lelouey, Prezidantino de la grupo bonvenigis la ĉestantojn kaj dankis Sinjoron Robiollé por lia helpo pri la kursoj kaj pri la preparado de la nacia kongreso de fervojistoj en Portbail (50) en 2006. Ŝi ankaŭ dankis Srojn Pasquette kaj Clot, la unuaj helpantoj de la grupo. Poste, la Prezidantino legis la agad raporton. Ŝi substrekis la sukceson de la ekzamenoj kiuj okazis en Januaro kaj la ĉeston de 5 membroj al la kongreso de Boulogne sur Mer. Ŝi diris la celon de la grupo : flue paroli Esperanton Sinjoro Chaudon faris la agadraporton kaj sinjorino Vanier la financan raporton.

Ĉiuj raportoj unuanime estis aprobataj.

Sinjoro Robiollé atentigis ke lingvo Esperanto estas pli kaj pli necesa en Eŭropo. Do, estas grave ke lernantoj daŭre studu kaj provu trapasi la trian-nivelan ekzamenon.

Estis decidate kunveni okaze de la "Festo de Reĝoj", venontan jaron. La kursoj okazas marde.

Antaŭ trinki la glason de la amikeco, ĉiu pagis sian kotizon al la grupo Esperanto - Cotentin kaj al la fervojista movado A.F.C.E.

Ĉiuj retroviĝis en restoracio por komune manĝi en agrabla etoso

Magdalena Lelouey

\*\*\*\*\*

**LINGVA STAĜO :** Partoprenu staĝon organizatan de Esperanto 44 la 4an kaj 5an de Februaro en Saint Aignan de Grand Lieu en la kastelo de la Plinguetière je 15 kilometroj de Nantes. Kursoj por komencantoj, progresantoj, praktikantoj kaj spertuloj

Petu informojn kaj aliĝilojn al : Hélène VINCENT 3 rue Blaise Cendrars 44100 Nantes Tél. 02 40 43 92 42

Retadreso : esperanto44. aol.com

## COTISATIONS 2006 DES ASSOCIATIONS NATIONALES ET INTERNATIONALES DU MOUVEMENT ESPERANTO

Apprendre la langue , c'est très bien ! Mais il est nécessaire de soutenir les associations qui militent en faveur de notre idée. Ces associations ne peuvent rien faire sans un soutien financier indispensable. Il serait souhaitable que les espérantistes soient aussi généreux que le sont les militants politiques et syndicaux. Espéranto - Normandie reste indépendant des différentes associations mais vous incite à y adhérer.

## UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO (UEA)

avec le Jarlibro et l'abonnement à la revue " ESPERANTO " : 56 Euros (sans la revue 22 euros)

**Association Mondiale des jeunes espérantophones (TEJO)** : les personnes de moins de 30 ans qui adhèrent à UEA sont automatiquement membres de TEJO et reçoivent à ce titre les revues “Kontakto “ et “TEJO - Tutmondo”

**ESPERANTO - FRANCE (U.F.E.)**

avec la revue "Le Monde de l'Espéranto" : 55 Euros

**Tarif réduit pour étudiants et chômeurs : 35 Euros**

Abonnement à la revue pour les non - adhérents : 30 Euros

## ESPERANTO - JEUNES (JEFO)

avec la revue "Jeunesperanto": 30 Euros (pour étudiants, chômeurs : 15 Euros)

Les cotisations pour ces 4 associations sont à régler à Esperanto - France 4bis rue de la Cerisaie 75004 Paris  
CCP 855 35 D Paris. Demandez au préalable un bulletin d'adhésion en téléphonant au 08 717 718 33 ou par  
courriel [info@esperanto-france.org](mailto:info@esperanto-france.org) (ou bien téléphonez à P.Quillaud 02 35 69 66 09)

En plus des cotisations et abonnements, vous pouvez aussi faire un don : un reçu fiscal vous sera adressé

\*\*\*\*\*

## SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA (SAT)

avec les revues "Sennaciulo" (mensuel) et "Sennacieca Revuo" (annuel) : 52 Euro]

à régler à : SAT - Peranto CCP 17333 10 N Paris

Envoyez votre chèque à Pierre Quillaud 16 rue Lt Vaisseau Paris 76120 Grand Quevilly

## SAT - AMIKARO

avec la revue mensuelle "La Sago" : 34 Euros

abonnement à la revue sans adhésion à l'association : 31 Euros

cotisation à régler à SAT - AMIKARO , 134 Bvd Vincent Auriol 75013 Paris , CCP 37 852 90 L La Source

\*\*\*\*\*

## ESPERANTO - INFO

Revue bimestrielle d'information en français sur la langue internationale

Abonnement simple 20 Euros (de soutien 30 E)

Esperanto - Info Col de Coperlac Mas Saint Chély , 48210 Sainte Enimie

CCP 11901 46 B Marseille

**Autres associations et revues** : Si on me fournit les informations, je les indiquerai dans le prochain bulletin

[illegible]

## KONGRESOJ EN NORMANDIO

Dum la jaro 2006 okazos en nia provinco 2 eventoj:

## La NACIA KONGRESO DE FRANCAJ FERVOJISTOJ EN PORTBAIL (Manche)

de la 7a gis la 14a de Aprilo 2006

## Kunvenoĵ, manĝoĵ, dormadoĵ en VVF

## La ĜENERALA KUNVENO DE ESPERANTO - NORMANDIO

Kun akordo kun la fervojistoj movado , nia ĝenerala kunveno okazos **:DIMANĈE 9an de Aprilo,** posttagmeze, en salono de VVF dum ekskurso de fervojistoj.

Nia lasta ĝenerala kunveno okazis en Hérouville dum junio 2005. Estas bone ke ni profitu la arangojn de la fervojistoj por organizi nian propran laŭstatutan kunvenon

Bonvolu jam noti tiun daton sur vian agendon

Estas du eblecoj :

- 1)- Vi ne laboros (aŭ vi ferios) : vi povos partopreni la tutan kongreson : ekskursoj, bankedo, spektaklo, distraj partoj, ktp... Vi plenigu la aligilon kaj sendu ĉekon al la kasistino de la kongreso
- 2)- Vi ne povos ferii kaj vi nur partoprenos la kunvenon de Esperanto Normandie. Vi alvenos dimanĉe matene kaj jam revenos hejmen dimanĉe vespere, post la kunveno. Indiku al mi (Petro Quillaud) ĉu vi deziras tagmanĝi kun ĉiuj en VVF.

## IMPRESOJ PRI MOSKVO

Finseptembre, dum du semajnoj, du geamikoj el "Hérouville - Esperanto" kaj mi vizitadis Rusion. Post nia sestaga restado en ĝemelita kaj ŝategata urbo Tihvin, apud Sankta Peterburgo kaj tagpromenado en Novgorod, ni trajne trafis Moskvon.

Tiu noktveturado estis nova sperto por mi. Suprenirante nian vagonon, ni devis montri nian pasporton. En nia kupeo (po 4 personoj) trajnvojaĝzorgantino proponis al ni litukojn, kovrilon, mantukon kaj eĉ teon por kelkaj rubloj. Unu horo, antaŭ celalveno, oni vekis nin kaj tiam preskaŭ ĉiuj volis samtempe tualeti...

Ĉe Moskva stacidomo, atendis nin nia sindonema gvidantino Svetlana kiu afable helpis, konsilis, tradukis kaj ofte promenadis kun ni.

En tiu metropolo, centoj da monumentoj, muzeoj, memorlokoj estas vizitindaj: do, ni elektis nur kelkajn. Kompreneble ni ne forgesis Ruĝan Placon (ĉu ruĝa, ĉu bela, (laŭ rusa lingvo) tiel kiel vi deziras. Tie, troviĝas ĉiovendejo GUM konstruita en 1895. Sude staras baziliko de Bazilo la Beata, konstruaĵo buntkolora, simila al tiuj de Disnejlando por kelkaj aŭ al korneto por aliaj! Apud Kremlo murego, situas maŭzoleo de Lenin el ruĝa kaj nigra granito kaj tribunoj por paradoj kaj solenaĵoj. Norde estas la ruĝbrika Historia Muzeo en kiu oni povas malkovri multe da eksponaĵoj el pra-kaj-nuna tempoj. Sude, kviete fluas Moskova rivero; tiu balta nomo signifas "marĉa" aŭ "meandra" rivero. Moskvo naskiĝis en la 11a jarcento; ĝi ne estas la plej antikva urbo de la lando; ĝi estas pli juna ol Novgorod, Suzdal, Rjazan, Smolensk.

Ankaŭ ni vizitis kaj admiris "Kremlon" kiu signifas "fortikaĵo en urbo". Antaŭe, ĝi estis farita el kverkaj traboj kaj poste el kalkoŝtonoj. Ĝi eltenis plurajn sieĝojn de malamikoj. Muregoj kun 19 turoj kaj 4 pordegoj ĉirkaŭas ĝin. Interne, oni malkovras katedralojn en kiuj arte kolektiĝas valoraj ikonoj kaj originalaj freskoj kaj belegajn placojn kun la kanono "Reĝo". Originitaj kaj buntaj kupoloj ĉielpintiĝas. En centro, estas palacoj kie loĝis aŭ loĝas patriarkoj, kaj ĉefajregantoj. Ni ankaŭ promenadis kaj gavis laŭ strato Arbat; ni povis vidi palacetojn de imperia stilo kaj domojn, ĝis modernajn. Tie rezidis verkistoj kaj artistoj kiaj Puŝkin, Tolstoj... Ekde 1980, tiu strato estis rezervita nur por piedirantoj kun, nun, multegaj vendejoj: "souvenirs, souvenirs..."

Moskva Metroo ankaŭ estas arta, arkitektura verko. Ĝi estis malfermata en 1935: la metrostacioj Majakovskaja, Komsomolskaja, Novoslobodskaja estas la plej bele ornamitaj kun marmoro kaj ceramikoj kaj ili aspektas kiel veraj palacoj kun freskaĵoj kaj skulptaĵoj.

Ankaŭ vizitindaj estas Placo de la Venko kaj Kolomenskoje, bieno de Moskvaj princoj. Ni admiris la diversajn famegajn centrojn de kultura vivo de Rusio kiel Tretjakova Galerio riĉa de rusaj ikonoj kaj pentraĵoj de impresionistoj aŭ avangardistoj...

Do, en Moskvo, vi ne povas enui. Dum nia restado, Svetlana ĉiĉeronis. Dank'al ŝi, ĉio bonordiĝis. Ŝi faciligis niajn administraciajn klopodojn kaj precipe ebligis al ni renkontiĝi kun aliaj tieaj samideanoj, ĉu en sia hejmo, ĉu en la moskva esperanta klubejo en kiu, vespere, ni aŭdis fame konatajn gekantistojn kaj verkistojn kiaj Miĥaelo Bronŝtajn kaj Lena Karpunina\*.

Geamikoj, mi konsilas al vi Moskvon. Tie vi ricevos bonegan akcepton kaj malkovros fantazion, baniĝante en la rusan muziklingvon kaj la misteron de la rusa animo

Claude FERRAND  
de Hérouville-Esperanto klubo

\* Lena Karpunina estas invitata de Yves Nicolas por fari turneon en Francio kaj kompreneble en normandaj kluboj dum printempo 2006

Petro KIJŬ

\*\*\*\*\*

**ESPERANTO - NORMANDIE** deziras al vi Ĝojan Kristnaskon kaj agrablajn finjarajn festojn !

**La Nova Jaro 2006** alportu al vi kaj al viaj familianoj feliĉon, prosperon kaj pacon

**Ĝi estu favora por nia komuna idealo :ESPERANTO !**

# CONGRÈS NATIONAL DES CHEMINOTS ESPERANTISTES

du 7 au 14 Avril 2006 au VVF "La Porte des Isles"

PORTBAIL 50580

(Tous les adhérents d'esperanto-normandie peuvent participer à ce congrès)

## PROGRAMME

- Vendredi 7 Avril :** Accueil des participants à la gare de Valognes  
Après le dîner : Présentation de la région
- Samedi 8 Avril :** Matin : Assemblée Générale des cheminots  
Après-midi : Excursion de Portbail à St Sauveur le Vicomte (Musée)  
Le soir : Banquet et spectacle folklorique
- Dimanche 9 Avril :** Matin : Conférence du Dro Bolognesi. Examens  
Après-midi : Excursion à Valognes et environs  
(ou Assemblée Générale d'Esperanto-Normandie)  
Le soir : Spectacle
- Lundi 10 Avril :** Excursion toute la journée : Promenade dans le Cotentin (Saint Vast, Barfleur, Cherbourg, les défenses allemandes)  
Le soir : partie distractive
- Mardi 11 Avril :** Excursion toute la journée : La cité de la mer, La Hague, Goury, Jobourg  
Soirée libre
- Mercredi 12 Avril :** Le Matin: Excursion à Bricquebec (Musée)  
Après-midi : Visite du château de Saint Lo d'Ourville
- Jeudi 13 Avril :** Après le petit Déjeuner départ de la majorité des congressistes  
Possibilité de rester au VVF le jeudi et le vendredi

### CONDITIONS de SEJOUR POUR UNE PERSONNE:

Pension complète, repas, boissons (sauf café), banquet, excursions et soirées, chambre pour 2 personnes (supplément pour une personne seule : 13 Euros par nuit), linge de toilette fourni

3 possibilités :

- 1°)- du Vendredi 7 au soir jusqu'au jeudi 13 au matin : 370 Euros (380 E après le 5 Janvier)
- 2°)- du Vendredi 7 au soir jusqu'au lundi 10 au matin : 150 Euros (160 E après le 5 Janvier)
- 3°)- du Vendredi 7 au soir jusqu'au vendredi 14 au matin : 420 Euros (430 E après le 5 Janvier)

\*\*\*\*\*

A découper

### BULLETIN D'ADHESION

A adresser à Madame Sylviane LAFARGUE, 8 bis Avenue Anatole France 94600 CHOISY LE ROY

Nom de Famille..... Prénom.....

Adresse complète.....

Je serai accompagné par : .....

Séjour choisi n°..... Tarif.....x Nb de personnes..... = .....Euros

Supplément pour chambre à 1 lit : 13 E par nuit X Nb de nuits .....= ....Euros

J'arriverai à Port Bail le.....à.....h

Je partirai de Port Bail le .....à.....h

Je joins un chèque de.....Euros, au profit de Sylviane LAFARGUE. Cette somme me sera remboursée, si j'annule ma participation avant le 25 Février 2006

Date.....

Signature.....

A envoyer

## ASSEMBLEE GENERALE D'ESPERANTO NORMANDIE

L'Assemblée Générale aura lieu le dimanche après midi 9 Avril 2006 à Port Bail pendant le congrès des cheminots.

*Ceux qui ne participeront pas aux arrangements du Congrès* pourront déjeuner au VVF le dimanche midi à condition de se faire connaître en m'adressant leur inscription accompagnée d'un chèque de 12 Euros par personne à l'ordre de "Esperanto-Normandie"

(Je ne connais pas encore le montant du repas. S'il est inférieur je vous rembourserai ultérieurement)

INSCRIPTION à envoyer à Pierre QUILLAUD 16 rue Lt Vaisseau Paris 76120 Grand Quevilly

NOM.....

Prénom.....

Je participerai au repas du dimanche midi 9 Avril au VVF de Port Bail et je joins 1 chèque de 12 E par personne

Date.....

Signature.....

\*\*\*\*\*

### LA ARBHAKISTO KAJ LA TOPOROJ

En Grekio, antaŭ 2.500 jaroj, iu iam ŝtelis la toporon de tre malriĉa arbhakisto. Por li estis katastrofo, ĉar li ne povis aĉeti novan, kaj ne plu povis labori kaj gajni la familian panon. Li do laŭtege lamentis, kriis sian malfeliĉon al la ĉielo kaj plendadis al la dioj :

- O granda Jupitero kiu ĉion povas, redonu al mi mian toporon, miaj geinfanetoj estas mortontaj pro malsato, mi ne plu povas haki kaj vendi lignon, toporo kostas dek drakmojn, kaj eĉ unu drakmeton mi ne havas ...

Tiel li brue plendis, ploris, ĝemis la tutan tagon, senĉese petegante Jupiteron ke li uzu liafavore sian ĉiopovon. Liaj lamentoj atingis kaj plenigis Olimpon, kaj Jupitero ne plu havis trankvilon ; li komencis senpaciencaĵi, ne plu povante okupiĝi pri la aliaj ĉielaj kaj teraj aferoj. Tial li vokis sian faktotumon, Merkurion, kaj lin diris :

- Iru sur la teron kaj aranĝu tiun aferon kiel vi volas, mi ne plu volas aŭdi la ĝemojn de tiu tedulo.

Merkurio do surmetis homajn vestaĵojn kaj petason (1), kaj iris al la kompatindulo.

- Kial ci ploregas o homo ? Li demandis.

La arbhakisto denove lanĉiĝis en longan rakontadon de sia malfeliĉo. Merkurio estis ŝercema ĉiopovulo : li volis testi la honestecon de la malfeliĉulo. Tial li aperigis antaŭ li toporon tute el oro, kun tenilo inkrustita per diamantoj, rubenoj kaj rozkoloraj beriloj ; kaj li demandis :

- Ĉu tiu toporo estas tiu kiun vi perdis ? Se jes, jen ĝi, ĝin reprenu !

- Kiom bela ĝi estas ! diris la arbhakisto, tute el oro ! Sed bedaŭrinde ĝi ne estas mia, kaj kiel oni povus haki lignon per oro ? Nur ŝtalo taŭgas. O kiom malfeliĉa mi estas, o Jupitero, min redonu mian toporon, mi ne plu povas nutri mian familion ...

Antaŭ la venanta lavango de novaj plendoj kiuj kolerigus Jupiteron, Merkurio rapide malaperigis la eloran toporon kaj aperigis duan, tute el arĝento, kun tenilo inkrustita per topazoj, smeraldoj kaj ametistoj :

- Ĉu tiu estas la via ?

- O kiel bela ĝi estas ! tute el arĝento ! Sed ĝi ne estas mia, bedaŭrinde ! O Jupitero kompatu min ...

Sed Merkurio interrompis la novan venantan plendofluon, malaperigante la arĝentan toporon, kaj aperigante la malnovan fortikan toporon el ŝtalo kaj ligno de la hakisto.

- Kaj tiu, ĉu via ?

- O jes, estas la mia ! O dankon kompatema Jupitero, vi savas la vivon de via servisto kaj de lia familio, mi denove povos labori, kaj ...

Merkurio interrompis lin denove, kaj por rekompenci la honestecon de la hakisto, li donacis al li, krom lian malnovan toporon, la oran kaj la arĝentan antaŭ ol reiri la Olimpon.

La arbhakisto vendis la du juvelajn toporojn kaj aĉetis domon, meblaron, belajn kaj varmajn vestaĵojn por sia tuta familio. Li konservis nur sian malnovan toporon por mem daŭrigi la produktadon de ligno por sia persona konsumo.

Henri ROUSSEAU

(1) Petaso : tradicia ĉapelo de antikva Grekio (France : pétase ; greke : pétasos)